# N I A  V O Ĉ O
## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**MAJO 2007**


**NEKROLOGO**

Fine de marto forpasis Juan Navareño Fernández, (membro-nro 20). Kutima ĉeestanto de la lundaj konversaciaj rondoj de MEL. Kiel profesia fervojisto li partoprenis en multaj E-kongresoj de la internacia esperanta fervojista asocio. Ĉe Club Amigos de Unesco de Madrido li instruis Esperanton dum kelkaj jaroj. Pace ripozu.

**ESPERANTA FILMO**

Antaŭ kelkaj monatoj atingis la esperantan publikon la filmo "Gerda malaperis" (72 min.), bazita sur la internacie konata samtitola lernolibro de Claude Piron. Ludas 18 geaktoroj, kaj kunlaboris 11 personoj plus 9-homa teknika teamo. La filmado postulis 6 monatojn de intensa laboro, kaj oni prezentis ĝin en la UK de Florenco, kie la DVD-versio furoris.

Nu, ni staras, antaŭ tre, tre bona ilo por ellerno de la lingvo, danke al bona prononcado, al subtitoloj en esperanto, la hispana kaj aliaj lingvoj, kaj al interesa intrigo. Akiru ĝin pere de Pedro A. Hernández Úbeda: esperantio@ono.com , tel. 667 721 951 .

**PLURAJ NOVAĴOJ**

La senpaga ĵurnalo "Qué", en sia valencia eldono de la 29a Marto aperigas ampleksan raporton pri la **Esperanto-Grupo de Cheste:**. http://www.quediario.com//pdfs/valencia/290307val.pdf

Denove la **Papo** salutis en Esperanto dum sia parolado de la Paska Dimanĉo 8an Aprilo: http://www.ikue.org/pasko2007/pasko2007.htm

En 2006 ŝrumpis ses **redakcioj**: Pola Radio, "La Migranto", "Rok-Gazeto", "Fonto" , la portalo Ĝangalo kaj "Sennacieca Revuo". Super nia gazetaro ĝenerale ŝvebas danĝere mortiga malamiko: la poŝtaj tarifoj. Tamen Pola Radio reaperis laŭ nova formulo aŭskultebla nur per interreto.

Plena kalendaro de Esperanto-eventoj: www.eventoj.hu/kalendar.htm

**Datumoj de UEA** por 2006: abonantoj: 11.732, individuaj membroj: 6.066

**AUGUSTO CASQUERO TRA LA MONDO**

En la pola urbo Bydgoszcz okazis en Marto ekzamenoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo kie Augusto instruis hispanan lingvon kaj kulturon al gelernantoj de la kvin kontinentoj. La oficiala instrua lingvo estas Esperanto. La gestudentoj de la tria jaro bakalaŭriĝas, kaj atingas la ŝtatan polan diplomon.

Je la komenco de Aprilo Augusto vizitis la e-asocion de Guanzhou (Kantono) en Ĉinio, kies sidejo troviĝas ĉe la 21-a etaĝo de 30-etaĝa nubskrapulo, bela kaj moderna. Ĉu en alia parto de la mondo troviĝas alia e-klubejo tiel alte situita? La esperantistoj tre varme akceptis lin. Li prelegis pri la E-movado en Hispanio. Augusto instruos tie kurson de hispana lingvo, trimonata.

Dum la Ĝenerala Kunveno de Internacia Klubo Esperantotur oni elektis kiel vicprezidanto de la Konsilio al Augusto Casquero, por 2007/2008.

**ESPERANTO-INVADO EN MYSPACE**

En la tre sukcesa retejo Myspace, kiun uzas la artistoj kaj bandoj el la tuta mondo, kelkaj Esperanto-artistoj faris siajn paĝojn por komuniki inter si kaj malkovrigi sin al neesperanta artistaro:

Kaj Tiel Plu http://www.myspace.com/kajtielplu
Dj Kunar http://www.myspace.com/djkunar
Dolĉamar http://www.myspace.com/dolchamar
Hotel Desperado http://www.myspace.com/hoteldesperado
Inicialoj DC http://www.myspace.com/initialsdc
Kore http://www.myspace.com/kore49
Le Punk http://www.myspace.com/lepunkmadrid
Martin & la Talpoj http://www.myspace.com/martinwiese
Piĉismo http://www.myspace.com/pichismo
Supernova http://www.myspace.com/supernovaeo
Stefano Keller http://www.myspace.com/saluton
Zhou Mack & La Fabo http://www.myspace.com/zhoumacklafeve
Vinilkosmo http://www.myspace.com/vinilkosmo

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretariino, Carmen Suárez, deĵoras lunde vespere (17,00-20,30h); dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

INFORMOJ pri kotizo, hoteloj, ktp pri la **Hispana Esperanto-Kongreso 2007,** Palos (Huelva) ekde 5a ĝis la 8a de julio 2007:

http://congreso.esperanto-andalucia.org (hispane) kaj
http://kongreso.esperanto-andalucia.org (esperante)

**EN MADRIDO**

En la **trinkejo O'Neill's** (Str. Príncipe 11, de Madrido) marde je la 22,00h oni povas praktiki diversajn lingvojn. Momente ne ĉeestas esperantistoj.

Kiel la pasintaj jaroj okaze de la "Tago de la Libro" en la "Círculo de Bellas Artes" de Madrido oni legis paragrafon de Don Kiĥoto en Esperanto. Ĉi jare estis Alejandro Pareja la leganto.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Laj konversacia-rondoj kiujn organizas Madrida Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7 Tel. 91 446 80 79.

***KURSOJ:***

**Vallecas**. Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo kaj je la 18,30-a meza nivelo. Tel. 667 721 951 .

**Tetuán**. Alejandro Pareja gvidas bazan kurson en "Biblioteca Pública Vázquez Montalbán", Francos Rodríguez 67, (Metroo Francos Rodríguez). La kurso estas por komencantoj, senpaga, kaj la lecionoj okazas la mardojn je la 7a vespere. Aliĝu ĉe la biblioteko, 91 398 07 23

**PLUAJ NOVAĴOJ**

Vikipedio atingis en Aprilo la rekordan nombron de 83.326 artikolojn en Esperanto.

La 17an de aprilo, kadre de la kulturtagoj en la Fakultato pri Psikologio de la Barcelona Universitato, programero estis dediĉita al Esperanto. Carles Verdugo kaj Jordi Aromí, aktivuloj de Kataluna Esperanto-Junularo, prezentis dum du horoj la internacian lingvon, ties historion kaj movadon. Ankaŭ la funkciado de la lingvo estis prezentita pere de lingva ateliero.

**La kotizo de MEL por la jaro 2007 estas 12,00 eŭroj**

VI povas pagi la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid, Banco Sabadell/Atlántico konto 0081 7110 98 0001266730

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid